

Paca Nokt'

Aŭskultu la konatan kristnaskan karolon Paca Nokt' kiun kantas Akordo kaj vidu filmon (el decembro 2012), kiu prezentas du kripojn, montrante la naskiĝon de Jesuo pere de statuetoj. Unu el la kripoj troviĝis en la bazaro Espero (Plaza de la Esperanza) kaj ĝi estis muntita de Javier Gutiérrez Morlote kaj lia edzino Gloria Saiz de Omeñaca, alia kripo situis en la preĝejo La Anunciado (Iglesia de la Anunciación), ambaŭ en Santander, Hispanio.

<http://www.youtube.com/watch?v=zf0CZIAFGhM>

(La tekston de la karolo vi trovos sur paĝo 130)



Krist' naskiĝis por ni!

KELI

**Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

Celo: *Krei efikan kontakton inter kristanoj el
diversaj landoj kaj per Esperanto
diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prezidanto: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,

FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;

☎ +33 (0) 549468021; ✉ keli@chez.com

Sekretario: Pavel POLNICKÝ;

✉ Na Vinici 110/10,

CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio

☎ +420 311 241 406;

✉ polnickypavel@seznam.cz

Kasisto: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS

✉ Klauzál utca 32,

HU 1072 Budapest, Hungario

☎ +36 302 000 306;

✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume
€20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono:
pagante rekte al KELI €16,- • pagante al
Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj
per registrita letero al la kasisto de KELI. •

Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto
(informiĝu ĉe UEA) bonvolu preferi pagi al UEA
por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de
'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale':

CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;

IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la tt-paĝon www.chez.com/keli/

DIA REGNO

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

Redaktoro: Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Nygatan 10 A; 281 48 Hässleholm; Svedio;

☎ +46 70 2004574; ✉ dr_board@yahoo.se

Kontrollegis: Éva FARKAS -TATÁR, Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ
egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la
kasisto de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la
aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke
oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ
traduko oni sendu al la redaktoro.*

Ekspedado: Pavel POLNICKÝ

Vidu la adreson de la sekretario

Presado: Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio

✉ info@astroprint.cz

Eldonmonatoj: meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

ENHAVO

Jarŝanĝiĝo	123
La amo de Dio	124
La staltrogo, homa digno kaj romantikismo	125
Mi dankas	126
Venĝo ! Venĝo ?	128
20.a Ekumena Kongreso 2014	129
Paca Nokt'	130
Invito al Bibliaj Tagoj 2014	131
Lukio Celio Firmiano LAKTANCIO	132
Skizoj pri filozofoj-kuracistoj IX	135
Membriĝo kaj abono	140
Informetoj	142
Kristo, ni kunvenis	144

REDAKTORAJ VORTOJ

Kiam mi estis infano mi ne komprenis
la plenkreskulojn, kiuj plendis pri la
rapida forpaso de la tempo. Jam estas
decembro denove. Mi nun simile ri-
markas la malsamajn perceptojn ĉe mi
kaj nia filo, kiam nia filo atendas la
Kristnaskon. Li ĉiutage kalkulas kiom
da tagoj ankoraŭ restas ĝis Kristnasko.
Interese, li antaŭ unu semajno forte
petis ke ni aĉetu kripjon kaj antaŭ la
ekdormo ni komencis legi el la infana
Biblio pri la naskiĝo. Granda ĝojo al
lia patro. Bedaŭrinde seninterrompe
atingas nin el ĉiu angulo de la mondo
teruraj kaj malgajaj informoj, ekz la
katastrofo en Filipinoj aŭ la morto de
Nelson Mandela. Malgraŭ tio mi
esperas ke ni trovos harmonion kaj
trankvilecon dum la estontaj festotagoj.
Per la vortoj de Jelly Koopmans-
Schotanus por la Sankta Vespero mi
deziras kaj preĝas ke "Paco, amo kaj
adoro venu anstataŭ la bruado".

Jarŝanĝiĝo

Philippe COUSSON, FR

Karaj gefratoj kaj gesamideanoj, ni baldaŭ transiras al nova jaro. Tio estas nur laŭ la kalendaro, laŭ la eŭropa kalendaro, kiun ni parte ŝuldas al la antikva Romo kaj al la papo Gregorio.

Vi scias ke ekzistas aliaj kalendaroj, aliaj jarŝanĝiĝoj. Oni kutime aŭdas pri la Roŝ-haŝana de la Judoj, pri la ĉina nova jaro, pri la islama novjara tago, sed estas ankoraŭ aliaj.

Kompreneble oni devas doni daton por la jarŝanĝiĝo. Tiu dato proksimas al la vintra solstico, kiu markas la denovan plilongiĝon de la tagoj. Tio aspektas scienca, kvankam ĝi estas fundamente pagana, proprasence celebranta la renaskiĝon de la Suno.

Eĉ ĝuste en tiu periodo la Eklezio decidis celebri la naskiĝon de Jesuo. Ne ĉar ni scias, ke li naskiĝis precize je tiu dato, sed ĉar oni volis forpreni la festomotivon de la paganaj solsticaj festotagoj.

Do la tuta folkloro ĉirkaŭ Kristnasko, neĝo, abioj, sledo, (eĉ en la suda duonsfero, kie estas somero) havas nenium rilaton al la alveno de nia Sinjoro Jesuo Kristo.

Se hazarde oni celebras Kristnaskon dum vintro, ni ne forgesu ke, eĉ kaŝita de la tuta komerca ornamajo, ni reme-



moras ke Dio decidis veni al la homoj por montri al ili sian amon kaj gracon, kaj ke tiu savproceso plenumiĝis ĉe la kruco kaj la releviĝo. Ni ne forgesu ke malantaŭ la Kristnaskaj simboloj troviĝas Johano 3:16 [laŭ la traduko de Gerrit Berveling].

*Ja tiom amis Dio la mondon,
ke Sian unikan filon Li donis, tiel
ke ĉiu kiu fidas je li, ne pereu sed
havu eternan vivon.*

Por reveni al jarŝanĝiĝo, ĝis mezepoko, ĝi okazis ĉe Pasko.

Ni do celebru kaj laŭdu nian Sinjoron, kiu amis nin ĝis kunvivi kun ni, morti kun ni kaj releviĝi antaŭ ni.

**Feliĉan Kristnaskon kaj
ĝojan novan jaron al ĉiuj!**

La amo de Dio

LASZLO Maria, RO

Mirindaj kaj multspecaj estas la diaj donacoj. La hodiaŭa homaro ege bezonas ilin. En la Biblio ni povas legi pri donaco de kompatato, de savo, de saĝeco, pri la amaj donacoj. Apostolo Paŭlo multe parolas en siaj leteroj pri spiritaj kaj animaj donacoj tiujn kiujn Dio donas al ĉiu homo laŭ mezuro por helpi fariĝi servantoj de Dio kaj por servi niajn gefratojn. Nun ni vivas en egoista, avida mondo plena de diversaj animaj kaj korpaj suferadoj. La koruptita homo anstataŭis la amon je Dio kun amo de mono. La celo estas akiri kiom multe eblas el ĝi. Bedaŭrinde la homoj forgesis la dian volon, ke ni amu unu la alian, kaj ni estu kontentaj nur pri ĉiutaga pano. En tiu sen dia vivo ni suferas pro la manko de familia, de patrino, gefrata kaj de kunececa amo. Kiam mankas la amo, tiam regas la soleco.

Partoprenante renkontiĝojn precipe kristanajn, mi vidis multajn maljunulojn irante pere de bastono, kun vidprob-

lemoj kiuj veturadis longan distancon forgesante ĉiujn malfacilaĵojn. Estiĝas la demando. Kial? Demandante multajn ĉeestantojn, ĉiam la unua respondo estis, por amikeco kaj por spirita evoluo, por ĝui fratan kuneston en afabla rondo. Dio deziras, ke la homo estu feliĉa. Li volas ligi ĉiujn popolojn pere de fido en unu granda eklezia familio. Li kompatas la pekantan suferantan izolitan homon. Pro tio malsupren kliniĝis al li helpante pere de diversaj donacoj. post la Babela miskompreno kaj Pentekosta miraklo ni ricevas la donacon de kompreno. Ĉar la lingvoj kunligas la homojn ni povus konsideri Esperanton donaco de Dio.

Ni menciuj la admirindan donacon de Sankta meso, kiu kreas kunecon kaj servas niajn animajn bonojn, pere de kiu Jesuo fortigas nin.

Je la fino ni rigardu la plej grandan dian donacon kiun pere de Sia amo, Dio sendis en la malhelan, malvarman mondon Sian Solenaskitan Filon.

Adorante Jesuon Kriston, la plej majestatan Donacon, kiu oferdonis sian vivon por ni, fidante je Li ni servu kaj obeu la volon de Dio. Ni estu amdonacantoj anstataŭante nian monamon per koramo.

Danko estu al Dio pro Liaj multaj neesprimeblaj donacoj.

☪

Laszlo Maria dum la kongreso
en Svitavy 2013



La staltrogo, homa digno kaj romantikismo

Leif NORDENSTORM, SE

En la apostola kredokonfeso ni legas “naskita el Maria la Virgulino”. Per tio ni konfesas nian kredon je Jesuo Kristo, la ununura filo de Dio. Tiuj, kiuj ĉeestis dum akuŝo, mem naskante aŭ rigardante, tuj komencas pensi pri doloro kaj suferado, sed ankaŭ pri granda ĝojo. Dio naskiĝis al la doloro kaj al la ĝojo, kiuj ekzistas sur la tero. Ekde pratempo la naskiĝo de Jesuo estis signo pri la solidareco de Dio, kun ni homoj. En Jesuo Dio ploris nian ploron kaj ridis kune kun ni. Li havis ĉiujn homajn sentojn, kaj tial li komprenis kiaj estas niaj vivoj. Kiel homo li ne scipovis naĝi, kaj tial li uzis sian dian energion por promeni sur akvo. Li verkis nenium libron, sed interrilatis kaj kun malriĉuloj kaj kun riĉuloj. Homoj daŭre estis liaj disĉiploj, post kiam Jesuo Kristo mem mortis kaj resurektis. Ĉio ĉi estis evidente en la instruo de la eklezio.

Dum kristnasko en multaj hejmoj kaj preĝejoj oni montras sanktajn kripojn. Multaj el tiuj kripoj estas malveraj kaj romantikismaj. La vera staltrogo certe estis en malpura, malvarma kaj trablova loko, kiu certe ne estis romantikisma.

Kristanoj en malriĉaj landoj ofte bone memoris la infanon en la staltrogo kaj la krucumitan kaj resurektintan Kriston. La fakto ke Jesuo naskiĝis, mortis kaj resurektis donas al ni homoj forton en la diversaj situacioj de la vivo.

En multaj svedaj preĝejoj konstruitaj dum la pasintaj jardekoj – kaj certe en preĝejoj en aliaj landoj – oni trovas nenium bildon de Jesuo. Ili donis sian lokon al ĝeneralaj artaĵoj. En kelkaj preĝejoj en la riĉaj landoj oni klopodis modernigi la mesaĝon pri Jesuo kaj donis ĝian lokon al ĝenerala homa humanisma mesaĝo, sed tio ne sukcesis. Eklezio sen klara centro – Jesuo Kristo – neniam sukcesas allogi homojn al io alia ol eble koncertoj kaj geedziĝoj. Tial la eklezio en la malriĉaj landoj estas pli fortaj ol iam antaŭe, dum la eklezio stagnas en la riĉaj landoj.

Ni bezonas kaj la infanon en la staltrogo kaj la krucumitan kaj resurektintan Kriston. Malsamaj bildoj de Jesuo, la Filo de Dio kaj nia Savinto, pliriĉigas la bildon de Jesuo kaj de tio, kion li faris por ni. Ni bezonas Jesuon en la centro de niaj preĝejoj. Ni povas nomi la bildojn romantikismaj, sed ili tamen funkcias. ✚

Gerard van Honthorst, 1622, detalo



Mi dankas

Helga PLÖTNER, DE

En mia koro kreskis la deziro danki al Vi por la sendado de treege bonaj, interesaj kristanaj revuo-ekzempleroj de KELI – DIA REGNO. Mi tre dankas por Via bona laboro! Ĉiuj kontribuoj, ĉiuj artikoloj kaj fotoj vere interesis min! Mi estas feliĉa, ke mi nun estas membro de Keli kaj nun mi legas la revuon DIA REGNO en mia lito tute en trankvileco, apude la Esperanto-vortaro, ĉar mankas al mi kelkaj, malmultaj E.-vortoj por kompreno. Tiumaniere mi perfektigos ankaŭ mian Esperanto-lingvoscion, ĉar ĉiuj kontribuoj vere interesas min.

Mi kredas je Dio, al la filo Jesuo Kristo. Li vivis, Li vivas inter ni kiel energio. Li ĉiam vivos!

Mi nun volas rakonti pri multaj mirakloj en miaj 68 vivjaroj: Mia patrino ĉiam preĝis, ankaŭ por mi. Mi havis multajn, diversajn, gravajn malsanojn. Ĉiam mi travivis. La kuracistoj diris ofte, ke estis miraklo.

Kiam mi estis infano, mi preĝis:

*Mi estas malgranda, mian koron
Vi purigu, devas neniu enloĝi
krom Jesuo sole!*

Denove miraklo: Antaŭ ol mi havis 54 jarojn, mi volis havi permesilon por stiri aŭton. La teorion mi faris bone. Sed por la veturado per aŭto mi praktikis 108 horojn, la duoblon de mia aĝo, mi eraris tro ofte kaj mi malsukcesis dufoje la ekzamenon. Bedaŭrinde nur poste mi

rememoris pril Dio. Mi preĝis elkore:

*Kara Dio, kara Jesuo, kara Sinjoro,
Vi scias, mia korpo doloras,
mi ne povas iri longan vojon, mi
ne plu povas porti pezon. Mi
bezonus permesilon por stiri
aŭton. Sed Sinjoro, Via volo estu!*

Subite mi estis tute trankvila. Dio ŝirmis min. Mi veturis tiel bone kiel neniam antaŭe, sen eraroj.

La stirinstruisto laŭdis min. Mi ricevis la permesilon tri tagojn antaŭ la Kristnaska Festo kiel donacon kaj mi estis feliĉa. Mia kredo kreskis kompreneble. Se mi povas paroli pri tio, mi rakontas pri mia kredo. Kiam mi nun stiras aŭton, ĉiam mi preĝas kaj dankas. Dankon! Dankon! Dankon! Matene, kiam mi malfermas la okulojn, mi preĝas por ĉio kaj dankas.

Denove miraklo: Mi preĝis por mia nepo Tim. Post 14 tagoj diris mia filino, ke Timmi volis konfirmacion. Mi ĝojis treege pri tio! Mi estis tre dankema, ke li lernus la Dek Ordonojn.

Ĉiuj gelernantoj, ankaŭ en la lernejo, devus lerni la dek ordonojn, la Dekalogon! Eble en la mondo estus pli bone, atentante unu pri la alia.

Nun alia vera miraklo: Mi trovis mian edzon sen vivsigno. Li ne plu reagis. Mi mem provis revivigi lin, sen sukceso. Mi telefonis, la kuracisto venis tre rapide, ili diris al mi, ke li atingis nivelon “Nulo”, ili provis

revivigii lin. Mi sidis en la kuirejo kaj petis el tuta koro Dion, Jesuon por la vivo de mia edzo. Poste la kuracistino diris al mi, ke li nun vivas. Tio impresis min! Mi estis dankema kaj feliĉa!

En la malsanulejo li estis 10 tagojn. Estis kolapso. Nenio plu. Li nun vivas.

Denove sekvis miraklo: Nun li volis edzinigi min finfine. Ni geedziĝis post 21 jaroj, nun ni estas kune jam 25 jarojn.

Tamen ekzistas kelkaj aliaj problemoj, sed mi scias; *Amo, Kredo kaj Espero* helpas nin.

Mi trovis en interreto la bonan frazon: *Esperanto havas la celon por monda paco*. Mi pensas, tiun celon ne havas la angla lingvo. Certe estas ankaŭ grave lerni la anglan kaj aliajn lingvojn. Sed nia Internacia Lingvo Esperanto estas treege bona ideo kiel ponto por monda paco, ankaŭ por KELI..

Jam en mia infaneco mi volis pacon

kaj komprenon en la mondo kaj unu lingvon Esperanto.

Mia patrino parolis pri tio. En 1980 mi havis eblecon lerni Esperanton.

En la revuo DIA REGNO impresis min, interalie, la agrablaj redaktoraĵoj vortoj, la raportoj pri la KELI-kongreso, la fido de pastro Wurmbrandt kun familio, la bildoj en la preĝejo Brönnestadt kaj la morto de Hieronymus Stroinski el Leipzig (Lejpcigo) (mi trovis preseraron: Leipzig.?). Mi rememoras pri s-ro Stroinski, ni renkontiĝis en Studeny en Ĉeĥio.

Kore salutas, ankaŭ la estimatajn legantojn, la kristanajn gefratojn

la portretpentristino Helga Plötner,
el Gräfenhainichen, Germanio



El *Preĝo por ĉiu Tago* de Jelly Koopmans-Schotanus

5. aŭgusto

Mia Sinjoro, mi dankas Vin pro la multaj benoj, kiujn mi ricevadas de Vi. Mi dankas Vin pro la lingvo Esperanto, per kiu mi spertadas tiom da bono, per kiu mi ricevadas tiom da geamikoj, kaj per kiu mi havas pli intiman kontakton kun Vi.

Tiun-ĉi libreton Vi povas mendi ĉe sekretario Pavel Polnický (adreso sur paĝo 2). Per la aĉeto Vi subtenas la agadon de Stichting Zienderogen, kiun iniciatis Jacques Tuinder.



Venĝo! Venĝo?

Julia SIGMOND, RO/IT

Malameginda vorto! Ĝi signalas mankon de amo.

Ni, homoj, – vole-nevole – ofendas unu la alian, per vortoj aŭ per agoj. Kaj la malbonaj vortoj aŭ la malicaj agoj, anstataŭ pardono, meritas venĝon – laŭ multaj personoj. (Neeviteble mi ekpensas, ĉu ĉi tiuj venĝemuloj neniam diras “Patro nian”... kiel ankaŭ ni pardonas...).

Eble mi eraras, sed laŭ miaj spertoj, la venĝodeziro montriĝas jam en la infaneco, aŭ eble ĝia manko evidentiĝas tre frue. Vere, ĉi tiuj infanoj apartenas al la malplimulto. Ili neniam refrapas! Prefere ili ploras, aŭ nur silentas, ofendite tristas. Ĉi tiuj silente eltenitaj, neniam venĝitaj suferoj restas neforges-eblaj por tiuj malvenĝemuloj.

... mi ekkomprenis la “ekzisto-rajton” de la venĝo

Vane mi pensadas, mi ne rememoras, (tiel antaŭlonge okazis!), kiam mi ekkomprenis la “ekzisto-rajton” de la venĝo.

Subite mi tion sentis, ke ne eblas ne reciproki malican agon. Mi sentis fortan venĝodeziron en mia animo. Oni devas puni! Oni devas venĝi! Sed ankaŭ tion



mi sentis, ke ĉi tiu “venĝo” devos esti tute alia, ke ĝin metite sur la alian teleron de la pesilo, ĝi devas egaligi, kvitigi aŭ kompensi, ĉar ĉiun malicaĵon nur per iu grandega bona ago oni povas “venĝi”!

Mi ne scias, kiel mi nomu tiun “venĝon”. Ja por iu sentema homo tiu ĉi “boneca-venĝo” signifas seriozan punon. Por iu akrasentemulo ĝi egalas fortan humiliĝon.

Ĉi “amo-venĝo” povas havi tamen ankaŭ grandegan edukan efikon por iu erarinta intelektulo. Bedaŭrinde, ĝi povus kaŭzi ankaŭ eternan koleron, ĉar tro sentemaj homoj ne kapablas elteni tiuspecan humiligon.

Ĝuste pro tio, delikate ni devas uzi ĉi tiun “pozitivan venĝon”! (Ĉi tion mi diras por mi mem, sed tiel, ke ankaŭ aliuloj povu kompreni.)

☪

20.a EKUMENA KONGRESO

Trento 16-23 Aŭgusto 2014 - Centro Mariapoli - Cadine

http://www.ueci.it/k_sento/ks_2013/ks_2013_n6.pdf [tallingve]

Post kvin jaroj oni reprenas la kutimon de la Ekumenaj Kongresoj. La lasta estis tiu de Wroclavo en 2009. Post la Bibliaj Tagoj de 2012 en Trento, kun la partopreno de malgranda nombro da homoj, oni manifestis la deziron, kaj flanke de katolikoj, kaj flanke de protestantoj, reveni al Trento por pli ampleksa Ekumena Kongreso.

La kongreso okazos ĉe “Centro Mariapoli” de Cadine, kiu estas



precipe vokita al ekumenaj renkontiĝoj. Inter alie, ĝi estas al italoj bone konata, ĉar tie okazis UECI-kongreso en 2008 [UECI = IKEU = Itala Katolika Esperantista Unuiĝo]. Ĉi tio estas nur antaŭanonco, ĉar la programo kaj la kotizoj ankoraŭ ne estas fiksitaj, tamen ni fidus je la ĉeesto de multnombraj italoj.

La ekumena agado estas unu el la statutaj celoj de IKUE kaj KELI, kaj neniam kiel hodiaŭ, la irado al la unuiĝo de la kristanoj estis tiom grava kaj urĝa. En la nuna mondo, en kiu tiom da kontraŭkristanaj fortoj celas flankenpuŝi nin, ĝis la martiro de tiomaj niaj fratoj, estas grave, ke ni superu la multajn hezitojn kaj la reciprokajn suspektemojn, kiuj nin disigas. Interalie la novaj kristanoj el malproksimaj landoj, kiuj alproksimiĝas al la Evangelio, ne povas kompreni ĉi tiujn disiĝojn. En nia malgrandeco ekpaŝu ankaŭ ni sur la vojon de la unuiĝo. Kristo tion volas kaj Li atendas signon de ni.

Frate,
Giovanni Daminelli
Prezidanto de IKUE

Aliĝilo

Tiuj, kiuj volas partopreni la kongreson, bonvolu kontakti la sekretarion Pavel POLNICKÝ kaj li tuj sendos al vi aliĝilon.

Pavel POLNICKÝ;
✉ Na Vinici 110/10,
CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio
☎ +420 311 241 406;
✉ polnickypavel@seznam.cz

Paca Nokt'

Paca nokt', sankta nokt'!
Songas stel'. En malhel'
Viglas ame la sankta par'.
Ĉarma knabo kun bukla
harar',
Dormu; gardos Ĉiel'.
Dormu; gardos Ĉiel'.

Paca nokt', sankta nokt'!
Tra la land' vibras kant':
“Ho paŝtistoj, mi diras al
vi:
Jen en stalo la beba Mesi',
Li de l' mondo Savant',
Li de l' mondo Savant'.

Paca nokt', sankta nokt'!
Tie ĉi Fil' de Di'
Donas amon el Dia kor'.
Por elsavo nun sonas la
hor':
Krist' naskiĝis por ni!
Krist' naskiĝis por ni!

ADORU 213

STILLE NACHT, HEILIGE NACHT • EG 46 • M (Stille Nacht): Franz Xaver GRUBER (1818), 1838 • germana T: Joseph MOHR (1818), 1838 • E: mozaiko, Kloster Kirchberg 1997

Pri kufimaj kristnaskaj simboloj

La **stelo** signifas konfirmon. Ke io naskiĝis (la stelo de Betlehemo), ke iu estas diligenta (la ora stelo en la lerneja kajero), aŭ ke ni estas kunligitaj (steloj sur flago/standardo). La stelo montras direkton al ni. La Stelo ilustras la ideon ke ekzistas difinita vojo por ĉiu individuo.



La **arbo** montras tradicion kaj vivon. Ĝi ankaŭ montras sekurecon. La arbo donas malstreĉon kaj trankvilecon al moderna homo.

La ideo de la kristnaska arbo parte originas el la arbo en la Edeno, kaj parte el la arbo de la vivo kun la radikoj en la tero kaj la krono en la ĉielo.



La **anĝelo** simbolas la protekton kaj ni trovas ĝin ĉie, sur skatoloj en kuirejo aŭ sur filmaj ekranoj. Ĝi kelkfoje simbolas ne eldiritan senton pri estonteco. La anĝelo estas la bildo pri la bono kiu kontrastas la malbonon, ekz. kiel voĉoj sur niaj ŝultroj. La anĝelo ankaŭ simbolas la pacon kaj la sopiron ke la morto ne estas nia fino.



❧

Invito al novaj ekumenaj

BIBLIAJ TAGOJ kun Adoru 2014!

de 30a de aprilo ĝis 4a de majo 2014
(merkrede vespere ĝis dimanĉe posttagmanĝe)

Tuchomeřice apud Prago

- Loko:** iama kastelo, nune klostro Tuchomeřice, Školni 1, 25267 Tucho-
meřice, apud Prago, facile atingebla kaj trajne/ buse, kaj aŭte, kaj
aviadile (rekta buso de la flughaveno al Tuchomeřice)
- Prezj:** 140 € por okcidentlandanoj, 120 € por orientlandanoj.
- Programo:** Prelegoj pri biblia temo, Diservoj kaj kantoj E-lingvaj, ekskurso al
Praga centro.
- Informo:** Stefan Lepping, stefanlepping@gmx.de (ŝanĝu la signojn <> al @)

Dio benu, via
Stefan Lepping!



Belan kristnaskan feston & Sukcesan novan Jaron

al ĉiu leganto de Dia Regno
deziras la sekretario & distribuanto
kaj la redaktoro

Pavel POLNICKÝ & Bengt Olof ÅRADSSON



Lukio Celio (aŭ Cecilio) Firmiano LAKTANCIO

unua parto

Gerrit BERVELING, NL

Pri Lukio Celio (aŭ Cecilio) Firmiano LAKTANCIO (*Lucius Caelius (or Caecilius) Firmianus LACTANTIUS*, ĉ 245-ĉ 320) oni scias tre malmulte. Supozeble li naskiĝis en la Romia provinco Afriko, estis docento tie pri retoriko, kiel lerninto de Arnobio, kaj poste en la imperiestra rezidejo Nikomedio, kie enoficigis lin Diokleciano.

Kiam ĉ 300 li konvertiĝis al kristanismo, tio implicis perdon de la posteno, sed la persekutadojn li postvivis, kaj fariĝis instruisto por filo de imperiestro Konstantino.

Stile Laktancio imitis Ciceronon kaj ties ekvilibrajn frazojn. Restas de li pluraj verkaĵoj, i.a. *La mortoj de la persekutantoj* (*De mortibus persecutorum*). Detaleme li priskribas en ĝi la emocian historion de la propra epoko, sed samtempe ĝi estas religia pamfleto kiu montras kiel tragedia morto de tiranoj estas puno por iliaj misfaroj. Verkite inter 318-321, dum multaj jarcentoj ĝi restis nekonata, ĝis en 1678 oni retrovis ĝin en unu manuskripto kiu tre malbone fartas; tio kondukis al pluraj tekstaj necertaĵoj. Kelkfoje oni dubas pri ĝia aŭtenteco, sed tra la historio ĝi havis sufiĉe da influo.

En la sekva fragmento li rakontas, ke en 312 Konstantino ĉe la ponto Milvia (aŭ Mulvia) trans la rivero Tibero en Romo atingas decidigan venkon super la kolego-imperiestro Maksentio. Konstantino estis kateĥumeno kaj flankis ĉe la kristanoj. Tiu ĉi venko estis turnopunkto: komenciĝo de nova erao: fino de persekutadoj kaj komenciĝo de favorata situacio.

El **La mortoj de la persekutantoj**:

44:1 Inter ili[1] la civitana milito jam komenciĝis. Kvankam Maksentio tenis sin en Romo, ĉar li ricevis orakolaĵon, ke li mortos, se li eliros ekster la pordojn de la Urbo, tamen oni batalis pere de lertaj generaloj. 2 Maksentio havis pli da trupoj, ĉar tiujn de sia patro li ricevis, kiuj antaŭ estis de Severo, kaj antaŭ nelonge sian propran armeon li retiris el la regiono de Maŭroj kaj Getuloj. 3 Oni ekbatalis, ĉe kio la trupoj de Maksentio estis pli fortaj, ĝis poste Konstantino – preta por ĉio – siajn soldatojn almovis al la Urbo kaj eksidis

fronte al la Milvia ponto. 4 Alproksimiĝis la tago, en kiu Maksentio ek-

La kombino de la grekaj literoj X kaj P simbolo de Kristo.



kaptis la imperiestran potencon, t.e. la sesan antaŭ la kalendoj de novembro, kaj alvenis la fino de lia kvinjara regadojubileo[2]. 5 Dumsonĝe Konstantino estis klare avertita, ke sur la ŝildojn de siaj soldatoj li metu la ĉielan signon de Dio[3] kaj ke nur post tio li ekbatalu. Li faris kiel ordonite. La literon X li rotaciis kvaronturniĝon, kurbigis la supraĵon[4] kaj tiel signis la ŝildojn per la Kristosimbolo. 6 Protektate de tiu signo la armeo prenis la armilojn. Avancis la malamiko, rekte al siaj kontraŭuloj, sen la imperiestro kaj iris trans la ponton. La batalvicoj interrompiĝis je larĝa fronto, kaj ambaŭflanke ekstremaforte estis batalate.

“Nek ĉi- estis fuĝo nek tiu-flanke[5].”

7 Intertempe en la Urbo okazis insurekcioj, la imperiestron oni skoldis perfidulo, kiu ne okupiĝas pri publika saviĝo. Subite, dum cirkofestojn li igis prezenti por festi sian naskiĝdaton, unuvoĉe ekkriis la popolo kontraŭ li, ke Konstantino ne estas venkebla. 8

In hoc signo vinces de Raffaello Sanzio



Konsternite de tiu kriado, Maksentio

Dumsonĝe Konstantino estis klare avertita, ke sur la ŝildojn de siaj soldatoj li metu la ĉielan signon de Dio kaj ke nur post tio li ekbatalu.

forkuris, kunvokis kelkajn senatanojn kaj ordonis konsulti la Sibilajn librojn[6]. Tie oni trovis, ke tiutage pereos la malamiko de la Romanoj. 9 Pro ĉi respondo, li ekhavis fidon esperi pri venko, kaj Maksentio foriris al la batalo. La ponto post lia dorso malkonstruiĝis. Kiam tion oni vidis, la batalo fariĝis pli akra – la mano de Dio regis la batalon. Panike Maksentio rapide fuĝis al la malkonstruita ponto. Ĉe la interrompiĝo li estis faligita en la Tiberon. 10 Kiam fine ĉi plej terura milito finiĝis, kun granda ĝojo senato kaj popolo de Romo akceptis Konstantinon kiel imperiestron. Li nun ekkonis la perfidon de Maksimino, kiam ties leterojn li konfiskis kaj la statuojn kaj portretojn malkovris.

11 La senato pro lia kuraĝo atribuis al Konstantino la titolon de unua Aŭgusto, kiun titolon arogis al si Maksimino. Kiam al li la informo pri la liberigo de Romo

estis transdonata, li reagis kvazaŭ li mem estus venkita. 12 Eksciiĝinte pri la senatdekreto li tiom ekfuriozis en sia ĉagreno, ke senkaŝe kontraŭ Konstan-

tino li vortigis la plejan malamikecon per insultoj miksitaj kun ŝercaĵoj pri la plej granda imperiestro.

daŭrigota

Krom tio de Laktancio restas ankaŭ kelkaj aliaj verkoj. Ni mencias pri lia ĉefverko, minimume laŭamplekse sed ne laŭinflue: *Instruado Religia* (Divinae Institutiones). Tiu ĉi titolo aludas al la konataj instruadaj verkoj pri juro de tiu epoko, el inter kiuj la plej konata estas la *Institutiones* de Gajo[7], kies tekston retrovis en 1816 B.G. Niebuhr.

Kalvino transprenis la titolon en sia ĉefverko *Institutio Christianae religionis* (Instruado pri la kristana religio). Tiu ĉi *Instruado Religia* enhavas 7 librojn: *de falsa religione* (falsa religio), *de origine erroris* (origino de l' eraro), *de falsa sapientia* (falsa saĝeco), *de vera sapientia et religione* (vera saĝeco kaj religio), *de iustitia* (justeco), *de vero cultu* (vera adorado), kaj *de vita beata* (feliĉa vivo).

Alia lia verko estas *La kolero de Dio* (De ira Dei). Por multaj filozofoj tio estis interna kontraŭdiro: Dio kaj kolero – kiel eblus? La Stoikuloj asertis, ke la Dio[8] nur estas bona; la Epikuranoj negis ke la Dio konas emociojn. Laktancio surbaze de Bibliaj argumentoj tion klare kontraŭas. Ĉar Dio estas bona, Li ankaŭ koleras kontraŭ la malbona realo. La *Sibilaj libroj* estas uzataj ankaŭ ĉi tie apud Bibliaj citaĵoj por subteni la rezonadon.

Fine ankaŭ la poemon *Pri la Birdo Fenikso* (De ave Phoenice) oni atribuas al li.



Komenco de *Divinae institutiones* de Lactantius skribita en Florenco ĉ. 1420–1430.

Rimarkigoj:

[1] Konstantino kaj Maksentio. La soldatoj hurais Konstantinon imperiestro de Gaŭlio kaj Britio kiel posteulon de la patro Konstantio Ĥloro. Maksentio deziris postsekvi la patron Maksimiano kiel imperiestro pri Italio kaj Afriko. En oriento regis Licinio en la Eŭropa parto, Maksimino Daja en la Azia parto.

[2] Du eraroj samtempe: la batalo ĉe la Milvia ponto okazis ne la 27-an de oktobro, sed la 28-an, kaj la regadojubilao estis festata ne en 312, sed en 311.

[3] La kombino de la Grekaj literoj X kaj P simbolo de Kristo.

[4] Pri la ĝusteco de la priskribo fakuloj diskutas.

Kelkaj supozas ke baze temas pri Kruco.

[5] Duoncito el Vergilio – *Eneado*.

[6] Cirkuladis iom obskuraj kolektajoj de diroj de Sibilaj. Sibilaj estis paganaj profetinoj. Poste ankaŭ Judoj kaj kristanoj kunmetis orakolajn tekstojn nome de Sibilaj. En Vatikano, en la Sikstina Kapelo, Michelangelo portretis ankaŭ Sibilan inter la profetoj. Ŝi ankaŭ rolas en la fama kanto *Dies Irae*.

[7] *Antologio Latina* 4, paĝ 284-287.

[8] La efektivan henoteismon de i.a. Stoiko mi indikas per "la Dio"; por monoteismo oni uzas "Dio" kiel solan. Politeismo simple rekonas plurajn Gediojn.

Skizoj pri filozoj-kuracistoj, IX

Eksa kuracisto – komandanto de revolucio – Ernesto Rafael “Che” Guevara de la Serna

DUDICH, Endre, HU

*Ek, ruĝuloj-proletaroj, flirtas la flag' en la vent'
marŝu do ni, kamaradoj, al nia glor-fina venk'.*

1. La enigmo de Che

Li estus pli ol 80 jarojn aĝa, se ne estus mortinta en la aĝo de 39 jaroj. Sed lia memoro vivas, kaj la prijuĝoj varias ekstreme, vekante fortegajn emociojn: entuziasman admiron aŭ ardan, senindulgan malamon.

Ĉu li estis imitinda heroo kaj respektinda martiro, aŭ freneza amasmurdisto?

La dokumentoj – veraj kaj falsaj –, informoj kaj misinformoj, skribaĵoj pri li, plenigus jam tutan bibliotekon. Ĉiu rajtas kaj povas disvolvi sian propran opinion. Mi nur klopodas selekti kaj prezenti fidindan kaj kiel eble objektivan informaron.

2. Vivovojo ĝis la kuracista diplomo

Ernesto Guevara naskiĝis en Rosario (Argentino), la 14-an de junio (fakte de majo) 1928. Lia patro, Ernesto Guevara Lynch, geodeto kaj inĝeniero, estis patrin-linie irlandano. La patrino, Celia de la Serna, estis filino de aristokratia, grandbienula argentina familio. Post Ernesto naskiĝis ankoraŭ du filoj kaj unu filino.

En 1930 Ernesto suferis la unuajn atakojn de astmo. La lukto kontraŭ tiu malsano daŭris dum lia tuta vivo. En 1932 la familio transloĝiĝas al la pli

favor-klimata Alta Gracia, proksime al la urbo Córdoba. Pro la malsano, Ernesto dum du jaroj estis privata lernanto. Tiam li iĝis pasia legisto kaj lernis la francan lingvon. Lia plej ŝatata poeto estis la ĉiliano Pablo Neruda.

La tuta familio simpatiis kun la maldekstruloj, ekz. kun la republikanoj de la hispana civita milito. En 1939 Ernesto aliĝis al la junulara sekcio de Acción Antifascista. En 1941 la familio transloĝiĝis al Córdoba. Ernesto vizitis ŝtatan mezlernejon, kaj eklernis ankaŭ la anglan lingvon. En sia libertempo li okupiĝis pri ŝakludo, biciklado, atletiko kaj futbolo. Nepre menciindas, ke li verkis 165-paĝan alfabetordan filozofian leksikoneton. En la jaroj 1945-1946 forte efikis al li la francaj ekzistencialistoj, Albert Camus kaj Jean-Paul Sartre.

En 1947 la familio transloĝiĝis al Bonaero, kaj Ernesto iĝis studento de medicino. Baldaŭ li estis asistento en la kliniko de profesoro Pisani (alergio-ologo).

Gravas la jaro 1948, kiam li konatiĝis kun marxista-leninista literaturo. Li havis provokadan konduton. Karakterizaj estas la karesnomoj, kiujn li ricevis: Loco (frenezulo), Chancho (Pork-

eto) Li adoptis la tiam modan devizon: “Vivi rapide kaj danĝere, kaj morti juna.”

En 1950 li faris bicikladon tra la tuta Argentino (4 mil km). Sed tio estis nur la komenco. Sekvintjare, en 1951 li entreprenis kontinentoskalan motorcikladon kun Alberto Granados: Ĉilio, Peruo (Hugo Pesce, la “perua Schweitzer”), Bolivio, Venezuelo, Miami, Bon-aero. (Pri tio temas la filmo “Taglibro de motorciklisto”.)

Reveninte hejmen, Ernesto faris la ankoraŭ mankantajn 13 (!) ekzamenojn, kaj en la jaro 1953 li ricevis kuracistan diplomon. Poste li faris duan rondvojaĝon, kun Carlos Ferrer: Bolivio, Peruo, Panamo, Gvatemalo. Tie li konatiĝis kun la indianino Hilda Gadea, kiu iĝis lia unua edzino. Pro politikaj kaŭzoj ili devis fuĝi el Gvatemalo, kaj setlis en Meksikurbo. Ernesto trovis kuracistan postenon en la Urba Hos-

pitalo.


Decida evento estis la konatiĝo kun Fidel Castro kaj liaj “monkadistoj” (tiel nomitaj pro la atako al la Moncada Barakoj) de Kubo en 1954, ĵus liber-igintaj dank’al amnestio.

3. Tri-jara militiro de Meksikurbo al Havano


Che tuj amikiĝis kun Fidel Castro: ili ja estis perfekte komplementaraj person-aĵoj. Guevara somere de 1955 edziĝis al Hilda Gadea. Li partoprenis en la militista trejnado de la grupo de Castro. Kiam la meksikia polico intervenis, li estis la sola, kiu deklaris sin komunista. Tio tiam estis pli da defio ol vero.

Kiam en decembro 1956 la malgranda luita ŝipo Granma startis el la haveno de Tuxpán (Meksikio), Guevara estis la kuracisto de la 82-membra taĉmento. Li obstine partoprenis en la fama gerileca militiro en la montaro Sierra Maestra. Post duonjaro, en julio 1957 Castro nomumis lin komandanto de la Kvara Kolumno. Baldaŭ li estis jam ŝtabestro de la Ribela Armeo. En 1958 Che Guevara direktis la ofensivon en la provinco Las Villas. Lia plej granda milita sukceso estis la okupo de la urbo Santa Clara (cetere, kun helpo de Carlos Núñez Jiménez, profesoro de geografio en la Universitato de Santa Clara, kapitano sub la komando de Che).

Post la fuĝo de la venkita diktatoro Fulgencio Batista, la 7-an de januaro 1959 Che sidis apud Fidel Castro en la tanko, kiam li triumfante eniris la ĉefurbon La Havana. Do li aperis sur la televidilaj ekranoj tutmonde jam kiel unu de la ĉefaj herooj de la triumfinta revolucio.



Che Guevara 1951.



Che Guevara 1960. Fotis Alberto Korda

4. Agado en la revolucia registaro (1959-63)

Kiel komandanto de la fortikaĵo La Cabaña, Che Guevara organizis la jurajn procesojn kaj zorgis pri la plurcentaj ekzekutoj. Li organizis Militistan kulturalan Akademion por la “kadroj” de la armeo, kaj verkis libron pri “La gerilamilito.” (Pro la eraroj de lia koncepto li finfine pagis per sia propra vivo.) Li faris rondvojaĝon en 11 landoj. Organizis la popolan milicion kun la devizo “Patrujo aŭ morto”.

Krom liaj militistaj funkcioj, li estis prezidanto de la Nacia Banko de Kubo (!), kaj estro de la departemento pri industrio de la nova Instituto Nacia por la Reformo Agra (INRA). Li enkondukis la devigan laboron kaj la reton de Vendejoj de la Popolo. Ankaŭ li mem partoprenis la klerigajn kursojn de supera matematiko kaj ekonomiko kiujn li ordonis aranĝi.

Li divorcis de Hilda (de kiu li jam havis filinon, Hildita-n) kaj ediziĝis al sia kunmilitintino, sekretariino kaj amatino, la blonda kaj blankhaŭta Aleida March. Ili ekhavis kvar idojn, laŭnome Almeidan, Kamilon, Celian kaj Erneston.

Che vivis puritane; cigaron li fumis (malgraŭ la astmo), sed ne drinkis, ne kantis, ne dancis. Estas konataj du liaj amatinoj; de unu el tiuj (Lucia Rosa Pérez) li havis eĉ filon, Omar-on. La alia estis Tanja Bunke, agentino de la orient-germana Stasi (ŝtata sekureco).

En la jaro 1960 Che faris rondvojaĝon (ne tro sukcesan) en la eŭropaj socialismaj landoj (unu tagon en Budapeŝto) kaj en Ĉinio. Hejmenveninte li petis Castron liberigi lin de la tasko de la Nacia Banko. Castro konsentis, sed nomumis lin Ministro pri Industrio. (Tiamaniere li iĝis superulo ankaŭ de la eksterlandaj geologoj laborantaj tiutempe en Kubo; inter ili estis ankaŭ hungaroj.) Rekonante ties neceson, Che komencis lerni la rusan lingvon.

En aprilo 1961 la CIA organizis aerajn atakojn al Havano kaj invadon ĉe Playa Girón. Tio fiaskis, helpe de sovetaj armiloj kaj manko de popola apogo al la atakantoj. Rezultis la trairo de Kubo al la socialisma vojo, kaj estiĝo de unusola Partio.

En aŭgusto 1961 okazis la konferenco de la Latinamerikaj landoj en Punta de Este (Urugvajo), kunvokita de Usono. Che Guevara gvidis la kuban delegacion, kaj psikologie venkis, regis la diskuton, kaj preteratentis la plurfoje al li direktitajn pafojn.

En 1962 la sovetoj transportis longdistancajn raketojn al Kubo kaj 42.000

elitajn soldatojn. La “Kuba krizo”, konfrontiĝo de N. S. Hruščov kaj J.F. Kennedy, dum kiu – en oktobro 1962 – la mondo balancis ĉe la rando de la nuklea mondmilito, finiĝis per la retiriĝo de “los rusos” kaj la blokado de Kubo fare de Usono.

Pro la malsukcesoj de la nacia ekonomio kaj pro la ĉiam pli malpaciencaj postuloj de la irititaj sovetoj, Castro “lasis fali” la utopian socialismon de Guevara. Tio fakte estis bazita – ĉu konscie, ĉu subkonscie – sur la heredaĵo de la “inka komunismo” kaj la sud-amerikaj redakcioj de la jezuitaj pastroj. Guevara insistis sur la edukado-kreado de “nova homo”. Li aperigis gravan artikolon en Montevideo: “La socialismo kaj la nova homo en Kubo”.

Che ricevis novan taskon. Li intense aktivis sur la internacia scenejo. Kvakam Kubo oficiale neis tion, li agadis por la eksporto de la revolucio.

En 1963 Che parolis en UN kaj vizitis kvin afrikajn landojn. En 1964 la stacioj de lia rond-vojaĝo estis Pekino, Ĝenevo, Parizo, Alĝero, Moskvo, Novjorko (UN) kaj Bamako (Malio). En 1965 li denove vizitis kvin afrikajn

Raul Castro kaj Che Guevara, 1958



landojn kaj Parizon. En Alĝerio li prezentis sensacian, “skandaligan” paroladon – en la franca lingvo –, akre kritikante la socialismajn landojn. Post tio, li demisiis de ĉiuj funkcioj, kaj sub pseŭdonomo la 1-an de aprilo 1965 forlasis Kubon.

La definitiva “sovetiĝo” de Castro, la formala estigo de la Komunista Partio de Kubo, laŭ la soveta modelo, jam okazis en la foresto de Guevara. La 3-an de oktobro 1965 Castro publike laŭlegis lian adiaŭan leteron – kiu cetere devintus okazi nur post la morto de Guevara. Li mem aŭskultis la elsendon kaj sentis sin “vive entombigita”.

5. Venko aŭ morto

Guevara intencis gvidi al venko la revolucian movadon gvidatande Kabila, aktivanta en Kongo (nun Zaire). Li flugis al Dar es Salam (Tanzanio), kaj kun sia taĉmento marŝis 1.600 kilometrojn (!) al Kongo. Sed Che kaj la nigrujoj ne komprenis unu la alian. La militaj akcioj fiaskis. Finfine Guevara devis fuĝi al Dar es Salam. De tie li flugis al Prago, kaj pasis tie duonjaron. Post tio li sekrete returnis sin al Kubo, kaj partoprenis en la selektado kaj milita trejnado de la elita taĉmento batalonta en Bolivio por la “liberigo de la tuta Sudameriko”.

Grava problemo estis la manko de apogo de la bolivia Komunista Partio kaj de la loĝantaro de la regiono. Paŝo post paŝo rompiĝis la kontaktoj de la 52-membra “Nacia Liberiga Armeo de Bolivio” kun la ekstera mondo, kaj finiĝis ĉiuj provizoj, eĉ la nemalhav-eblaj por Che medikamentoj. La “revolucia milito” en majo de 1967 degeneris

je unuflanka homĉasado en la zono Vallegrande – Ĥancashuazu, fare de regimento de rangers, t.e. 650 soldatoj trejnitaj por batalado en la tropika prarbaro. Krom tio kunmilitis pluraj aliaj taĉmentoj, inkluzive helikopterojn; pli ol 2.000 homoj. La “prezo” de Ĥe estis 4.200 dolaroj...

La 8-an de oktobro 1967 kapitano Gary Prado Salmón el la vilaĝeto La Higuera (La Figarbo) sendis telegramon al siaj superuloj: “Paĉjo estas kaptita.” La respondo estis unusenca: “Nada de prisioneros. (Neniajn kaptitojn)”.

La vundita Ĥe Guevara iĝis mortpafita, kaj la mortinto estis prezentata al la interesiĝantaj kamparanoj en la preĝejo de Sankta Martino.

Lian maldekstran manon la venkintoj sendis al la centro de CIA en Langley, Usono. La kadavro malaperis, kun la ceteraj ses, postkiam ili estis montrataj al la ĵurnalistaroj en la flughaveno de Villagrande.

El la komunistaj partioj de la mondo, nur la itala konsideris Guevara-n martiro, kaj Kubo funebris dum 30 tagoj.

6. Ĉu venko post la morto?

Jam en la sekvinta jaro, en majo 1968 en Parizo, Ĥe Guevara estis unu el la idoloj de la ribela studentaro. Poste sekvis pluraj “ondoĵ” de tiu idoladoro. Lia portreto eĉ nun aperas sur multaj memorobjektoj – Ĥe iĝis varo!

En la jaro 1997 la korpaj restaĵoj de Guevara iĝis trovitaj kaj transportitaj al Kubo. Estas konstruita maŭzoleo en la urbo Santa Clara.

Surloke la indianoj komencis kulton de Ĥe Guevara. Ili nomas la preĝejon tiu de Sankta Ernesto (!) kaj pilgrimadas tien. La Ruta (Vojo) de Guevara estas populara programo de organizitaj vojaĝoj.

Eble la plej neatendita opinio estas, kion esprimis Papo Johano Paŭlo la 2-a vizitante – laŭ propra deziro – la Memormonumenton de Ĥe en Santa Clara:

“Guevara dum sia tuta vivo serĉis, kiel li povus helpi al la nenihavuloj. Estas Dio kiu prijuĝos lin ... kaj mi estas konvinkita ke li volis servi la malriĉulojn.”

Kanto pri la Komandanto

*Vin sekvi vokas la monto
Ekzemplas via kuraĝo
Eternas via junaĝo
Venki vin ne povis la morto*

*Heredaĵo junulara:
La milito daŭrigenda
Estas, laŭ nia legenda
Komandanto Ĥe Guevara.*

*

*Komandanto Ĥe Guevara
estus nun jam okdekjara.
Pri li parolas la vento,
pri tutmonda fina venko.
Estas kun ni la senpara
Komandanto Ĥe Guevara.*



Membriĝo ĉe KELI kaj abono de Dia Regno per pago de la kotizo kaj sendo de la adreso al la kasisto

Kotizoj de KELI 2014

Individua membro (kun Dia Regno)	20,00 EUR
Familia membro (sen DR)	2,00 EUR
Subtenanta membro (kun DR)	30,00 EUR
Dumviva membro (20-obla jarkotizo)	400,00 EUR
Abono DR (sen membreco) pagante rekte al KELI	16,00 EUR
per libroservo	18,00 EUR
KELI-anoj rajtas aboni ESPERO KATOLIKA pere de la KELI-kasisto	12,50 EUR
IKUE-anoj rajtas aboni DIA REGNO pere de C.O. de IKUE	10,00 EUR
Aerpoŝta sendado al ekstereŭropaj landoj	3,00 EUR
Adopta Kaso (por ebligi al finance malfortaj membroj ricevi Dia Regno-n)	Donaco

La liga gazeto Dia Regno aperas 6-foje jare

Pagmanieroj:

1. Pere de landa kasisto/reprezentanto (vidu ĉi sube),
2. Poŝtgire al **Universala Esperanto-Asocio**, Rotterdam, kaj menciu:
por KELI-konto **kelk-p**
konto-numero en Belgio: 000-163 1831-97
Germanio, Köln: 3182 91 509, BLZ 370 100 50
Svedio: 74374-0
Svislando (Bulle): 12-2310-0
3. Per via konto ĉe UEA al la KELI-konto: **kelk-p**
4. Per ING BANK en NL al **Universala Esperanto-Asocio**, Rotterdam, menciu:
por KELI-konto **kelk-p**: BIC: INGBNL2A, IBAN: NL72 INGB 0000 378 564
5. CIC-BANK en Francio por KELI. BIC: CMCIFRPP, IBAN: FR76 1009 6182 45.
Per via konto ĉe UEA kaj menciu: por KELI-konto **kelk-p**
6. Per internacia poŝtmandato, adresita al la KELI-kasisto:
Ágnes Ráczkevy-Eötvös, Klauzál utca 32, HU 1072 Budapest, Hungario;
☎ +36 302 000 306; ✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

Membriĝo ĉe KELI (kaj la nacia sekcio) per la landa
reprezentanto, kiun vi bonvolu kontakti.

Landaj kotizoj:

Britio:	15 GBP	
Nacia ĝirokonto n-ro 65 274 0006		Jean Bisset, 47 Airbles Crescent,
“Fellowship of British Christian		Motherwell, ML1 3AP;
Esperantists (FBCE). Kasisto: S-ino		✉ jean@bisset100.freeserve.co.uk

- Bulgario** *)
 Peranto: S-ino Ivanka Kircheva
 Stoyanova
 P.O. Box 701, BG-9000 Varna
 ☎ + 359 52 639628,
 ✉ ivanka_esperanto@abv.bg
- Ĉeĥa Respubliko** 250 CZK
 kaj
- Slovaka Respubliko** 15 EUR
 Peranto: Pavel Polnický, Na Vinici
 110/10. CZ 29 001 Poděbrady II,
 ☎ +420 311 241 406,
 ✉ polnicky@quick.cz
- Estonio** *)
 Peranto: Endel Ojasild, PK. 24,
 EE-10502 Tallin,
 ✉ endel.ojasild@gmail.com
- Finnlando** 30 EUR
 Eblas aboni Dia Regnon uzante
 landan peranton de UEA aŭ laŭ la
 pagmanieroj menciitaj sur antaŭa
 paĝo.
- Francio** 25 EUR
 CCP n-ro 10 456 15 U Paris,
 “Franca Evangelia Esperanto-Ligo
 (FEEL)”. Kasisto: Samuel Gaillard
 5 rue Maurice Ravel,
 FR-63800 Courmon d’Auvergne
 ☎ +33 (0)4 73 84 31 31,
 ✉ samuel.gaillard@ac-clermont.fr
- Germanio** 24 EUR
 Evang. Darlehns-genossenschaft
 Kiel n-ro 47 00 40, BLZ 210 602 37
 “Esperanto-Liga für Christen in
 Deutschland e.V.”
 Kasistino: Hedwig Fischer, Gustav-
 Adolf-Str. 2a, D-48356 Nordwalde,
 ☎ 02573 / 626,
 ✉ hetifisch@googlegmail.com
- Hungario** *)
 Peranto: Irén Bagi, Baross u.
 54/B.II.8, HU 1201 Budapest
 ☎ 01 283 6566
- Japanio** 20 EUR
 (aerpoŝte + 3 EUR)
- Korea Respubliko** 20 EUR
 (aerpoŝte + 3 EUR)
- Nederlando** 20 EUR
 (por membroj de KUNE +5 EUR)
 Poŝtbankkonto n-ro 108 75 75
 “Chr. Esperanto Verg. KUNE”
 Kasistino: Gerda Dercks,
 Molenstraat 20, 7607 AL Almelo
 ☎ +31(0)546 819 403,
 ✉ gcamdercks@home.nl
- Pollando** 30 PLN
- Rumanio** *)
 Peranto: Maria László, OF1.C.P.
 38 Exterior, 4800 Baia-Mare
 ☎ 062 426182,
 ✉ laszlo_maria@yahoo.com
- Rusio** *)
 Peranto: Larisa Kuzmenko,
 Kuŝvinskaja 25 A, 622013 N. Tagil,
 Sverdlovskaja Obl. Rusio,
 ✉ klarisa8@yandex.ru
- Slovaka Respubliko** (vidu ĉe Ĉeĥa
 Respubliko) *)
- Svedio** 250 SEK
 Poŝtĝirkonto n-ro 9 14 39-0
 “Kristliga Esperantoförbundet”
 Kasisto: Bengt Olof Åradsson,
 Nygatan 10 A, lgh 1102;
 S-281 48 Hässleholm; Svedio
 ☎ +46 (70) 2004574;
 ✉ dr_board@yahoo.se
- Svislando** 20 EUR
 Pagu al la svislanda UEA-konto
 (vidu supre)
- Usono** 30 USD
 Oni sendu ĉekon aŭ poŝtmandaton
 al la peranto: Jerald T. Veit, 3578
 S. Taylor, Milwaukee, WI 53207
 ✉ geraldveit@yahoo.com

*) kotizo laŭ interkonsento kun la peranto

Informoj

Letero al
la sekretario

Kara Pavel,

Dankon pro via mesaĝo. Mi ĝojas pro viaj klarigoj. Do kiel oni povas krei aktivajn sekciojn tiel ke ankaŭ mi provu starigi Kristanan Esperanto Ligon mialande? Estas bone kunvenigi Kristanajn Esperantistojn tiel ke ankaŭ ni kunlaboru en tiu kampo.

Alie jen mia koresponda deziro ke mi dezirus korespondi kun Kristanaj Esperantistoj. Mia nomo estas S-ro Dismas Robert, P.O. Kesto 354_BUNDA_MARA_TANZANIA. Mi estas 43 jara kaj havas familion. Mi estas pastro en eklezio ĉi tie en Bunda urbo, norde de Tanzanio.

Mi ĝojus trovi iun, kiu volonte korespondus kun mi.

Amike salutas vin

Dismas Robert.<dismasrobert72@gmail.com>

Agado ĉe Taize en Strasburgo

Ni informas vin ke, dum la internacia ekumena junulara renkontiĝo organizata de la komunumo de Taizé en Strasburgo, la strasburgaj esperantistoj organizos:

- esperantistan grupon, por vere ĝui internacian renkontiĝon en la lingvo internacia dum la renkontiĝo,
- budon je la 30-a kaj 31-a de decembro por diskonigi la internacian lingvon ĉe la junuloj.

La Taizé renkontiĝo kunigos pli ol

20 000 junulojn de la tuta Eŭropo en frateca etoso. Vi povas viziti la multlingvan retejon por pli da informoj: www.taize.fr/en_rubrique45.html.

Se vi planas partopreni la eventon, ĉu kiel esperantista junulo ĉu por helpi al la diskonigo de Esperanto, kontaktu la fraton Benoît Ente: benoit.ente@gmail.com.

Bonvolu diskonigi la inviton !

La grupo Esperanto-Strasburgo


Uzu kaj ĝuu la trezorojn en la retejo ...

KRISTANAJ FONTOJ

Unua paĝo || A - Z | Adoru | Biblio | Breviero | Meslibro | Traktatoj | Trezorejo | 📶 | 🇩🇪 | 🇬🇧 | 🇫🇷

Ĉu ... preĝi | mediti | ricevi instigojn || kanti | muziki || informiĝi | legi | studi || prepari Diservon

Unua paĝo



Elektu vian gvidvorton:

Adoru
Biblio
Breviero
Meslibro
Traktatoj
Trezorejo

preĝi
mediti

Hodiaŭ:

9 decembro 2013

SPIRITAJ IMPULSOJ

BREVIERO

VESPERA LAŬDO
(nur dimanĉe)

En la retejo KRISTANAJ FONTOJ la iniciantoj Albrecht Kronenberger kaj Bernhard Eichkorn, kune kun la prizorganto Albert Urban, kolektas multajn gravajn kristanajn materialojn. Tiu kolektaĵo formas veran trezorejon. Inter la trezoroj vi i.a. trovas plurajn numerojn de antaŭaj Dia Regno, kantojn post ADORU, brevieron, la tutan Biblion kaj multajn aliajn trezorojn. Utiligu ĝin!

/redaktoro

Alia maniero plifortiĝu
en Esperanto



Invito al PRINTEMPaS, intensivaj kursoj kun Radojica Petrović kaj Christophe Chazarein kaj internaciaj KER-ekzamenoj (B1, B2, C1).

De 26a de aprilo ĝis 4a de majo 2014 en la franca Esperanto-kastelo Greziljono. Retejo: <http://gresillon.org/printempo>

Kontakto: kastelo@gresillon.org, +33-2.41.89.10.34, Maison Culturelle de l'Espéranto, Grésillon, St. Martin d'Arcé, 49150 BAUGÉ, France.



Kristo, ni kunvenis

(originale verkita)

E B7 E

1. Kris - to, ni kun - ve - nis,
2. Vi en Vi - a vor - to,

A E

Vi - a ge - fra - tar'.
Vi en pan' kaj vin'

B7 E

Ki - el Vi fes - te - nis
per Spi - ri - ta for - to

A E

kun la dis - ĉi - plar',
pli - ri - ĉi - gas nin.

B E

ti - el Vi nun fes - tas
«Es - tas» aŭ «sig - ni - fas»

A E

kun la e - kle - zi'.
ne dis - i - gu nin.

A E A E

Vi en ver' _____ ĉe - es - tas:
Kris - to nin _____ kun - i - gas.

B7 E

Di - o in - ter ni.
Di', ni dan - kas Vin.

KRISTO, NI KUNVENIS • M (Saßen vier beisammen): Rudi Rogoll en *Die Mundorgel*, 2a eldono 158 • © copyright control • E (originale verkita): Albrecht Kronenberger 2013-11-16